

Mi kredas je Dio

CREDO (Duonduta Meso)



1. Je Dio, la Patro, / la Mondo-Kreinto,
kiu nin amas, / kiu favoras.
2. Je Jesuo Kristo, / homiĝinta Di-Filo,
nia frato, / kiu nin savas.
3. Je la Sankta Spirito, / – ŝtormo kaj fajro,
kiu vivigas / kaj sanktigas.
4. Je la eklezio, / la komuno de l' sanktuloj,
je l' peko-pardono, / je l' viv' eterna.

CREDO (Duonduta Meso) • M kaj E: Albrecht Kronenberger 2017-07-22

aŭ la Apostola Kredkonfeso el la Meslibro:

1. Mi kredas je Dio, / la Patro ĉiopova, / la kreinto /
de la ĉielo kaj de la tero;
2. kaj je Jesuo Kristo, / Lia unu-nura Filo, / [- -] /
nia Sinjoro,
3. koncipita per la Sankta Spirito, [†] naskita el Maria
la Virgulino, / suferinta sub Poncio Pilato, /
krucumita, [†] mortinta [†] kaj entombigita, /
sobirinta en la regnon de la morto.
4. La trian tagon Li releviĝis el la mortintoj, [†]
supren-iris al la ĉielo, / sidas dekstre de Dio, la
Patro ĉiopova, / de kie Li venos, / por juĝi la
vivantojn kaj la mortintojn.
5. Mi kredas je la Sankta Spirito, / la sankta katolika
eklezio, [†] la komuno de la sanktuloj, / la pardono
de la pekoj, / la releviĝo de la mortintoj, [†] kaj la
vivo eterna.

Adapto: Albrecht Kronenberger 2017-07-19